

FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND

K. V. E. V.



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

F. U. K. E.

REDAKCIO : C. V. HOOGSTRATEN, O. PRAEM. - ABDIJ GRIMBERGEN (B)

INTERŜANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

ESPERANTO IN PLAATS VAN CHRISTUS !

In « De Dag », neutraal dagblad, verschijnt elke week een artikel over Esperanto. Hoe daarin propaganda gemaakt wordt voor onze taal, moge blijken uit een artikel, getiteld « Esperanto en Kerstmis », dat we, ofschoon het ons zoo laat onder de oogen kwam, toch eens hier bespreken. En dat om te bewijzen tot welke onzinnige en belachelijke leering het homaranisme en interna idee van Dr Zamenhof bij de « neutralen » aanleiding geeft, en tevens om te toonen welke absurditeiten de zoovele onverstandige katholieke lezers in de zoogenaamd neutrale bladen worden opgesolferd. We zullen ons tevreden stellen enkele zinnen aan te halen, waarvan zelfs een kind de valscheid kan inzien. Het artikel was ondertekend « Calciviro ».

« Wees niet ongeloovig, lichtvaardig of te eng in uw denken, want vele groote geesten reeds voor u en niet u, zijn er niet in geslaagd de universaliteit en de algemeen menselijkheid van dat feest (Kerstmis) te peilen !... Ik geef u al het heerlijke van den Kerstdag kadeau voor één zin, één formule, die zoo dikwijls verkeerd geleerd en geleefd wordt en soms weinig begrepen door geloofsmenschen zelf, ik bedoel : « Vrede op aarde aan ALLE MENSCHEN VAN GOEDEN WIL ! » Om die formule is Kerstdag een Esperantistendag ! Want de basis waarop de Kerstgedachte den vrede bouwt is dezelfde als die waarop wij, Esperantisten, voor wereldvrede ijveren. Kerstmis is niet alleen een feest voor de geloovige menigte, het is het ook voor de HEELE menigte. »

Wij zijn niet ongeloovig, noch eng, noch lichtvaardig en daarom juist vragen wij hoe het mogelijk is dat Kerstmis een feest is ook voor de ongeloovige menigte. Indien men gelooft dat de woorden : « vrede op aarde enz. » (die volgens Calciviro de algemeenheid van het feest veroorzaken) werkelijk van den Hemel kwamen, moet men logisch ook heel de leer van Kristus aannemen als de leer uit den Hemel, dus de ware ; en omgekeerd wanneer men niet in Kristus gelooft vergt de logica dat men nog minder waarde hecht aan hetgeen rond Kristus' geboorte gebeurde. Dat is duidelijk en daarom : Kerstmis blijft het feest voorbehouden aan de geloovige Christenen alleen.

Dat de woorden « vrede aan de menschen van goeden wil » dikwijls verkeerd begrepen en beleefd worden, dat geven we gaarne toe : dat gebeurt o.a. door Calciviro zelf. In het Grieksch luidt de tekst : « epi gês eirênê en anthropois eudokias », wat letterlijk beteekent : op aarde vrede in de menschen van (Gods) welbehagen. De engelen wenschen vrede in de menschen waarin God Zijn welbehagen vindt.

Dat de vrede onder de menschen onderling van de goede wil van elk afzonderlijk zou kunnen afhangen is utopie, tenzij allen dezelfde goede wil hadden, n.l. die om Kristus' leer aan te nemen en te beleven. (Zie Flandra Katoliko n° 2, jg. 3.)

« Het bindt niet alleen in één verzoening menschen van één geloof, maar het maakt tot één familie ALLE menschen van IEDER geloof. Waar het op aankomt is de goede wil. »

Het komt dus aan op de goede wil (!) alle godsdiensten en afgodsdiensten voor even goed te verklaren.

« Niet hij die God heeft en bezit is daarom begenadigd, maar gezegend is hij die God zoekt. Niet hij die instinctief als een dier blind zijn God vereert en huldigt is daarom de uitverkorene, maar hij die heel zijn mensch-zijn ook zijn verstand en zijn rede, in dienst stelt van het zoeken naar het Ware, het willen van het Goede... »

God hebben en bezitten en niet begenadigd zijn is « contradictio in terminis ». De kristenen vereeren en huldigen hun God niet blind, maar omdat ze weten dat ze dat doen op de wijze door God zelf geopenbaard. De ongeloovigen die naar de waarheid zoeken met goede wil worden uitverkoren, dat geven we toe.

« Er loopen veel goddelooze geloovigen rond, zooals er vrome ketteren en heilige vrije denkers zijn. »

Indien Calciviro geen nieuwe beteekenis uitvond voor geloovige, ketter en vrijdenker, is zijn bewering 100 % onzin.

« Niet één godsdienst snoert de menschen samen, maar hooger dan één geloof zijn ALLEN EEN, waar hun goede wil één en dezelfde is. »

Jawel, de katholieke godsdienst snoert de menschen samen, als de katholieken hem maar beleven, beter dan Calciviro, die waarschijnlijk een gedoopte is maar in zijn uiterst goede wil zijn plichten en geloof over boord geworpen heeft. Met goede wil kan men inderdaad de éénheid bewaren maar... hoe kan men die goede wil bewaren als die geen fundament heeft op het Geloof? We bekennen dat wij heel wat minder vrede zouden hebben met onze medemenschen indien we geen Geloof hadden.

Maar nu : (het artikel gaat crescendo)

« Ieder der menschen heeft recht op zijn eigen geloof — of hij er al of niet aanspraak op maakt — en dat is in onze aardse maatschappij mogelijk als hij maar het goede wil. De ééne en eenige godsdienst is die van den goeden wil, die van de Kerstmisviering. »

God bestaat of bestaat niet. Indien Hij bestaat kan er maar één God bestaan en dus

ook maar ééne ware godsdienst, indien Hij niet bestaat kan er ook geen godsdienst bestaan. Maar God bestaat en meer dan dat ; Hij zelf heeft de ééne ware godsdienst geopenbaard. « Ieder heeft recht op zijn geloof ». Daar twee tegenstrijdige gelooven niet beiden waar kunnen zijn, volgt daaruit dat (volgens C.) de mensch ook het recht heeft een geloof te hebben dat niet waar maar valsch is. Wel een benijdenswaardig recht, het recht om bedrogen te worden. Calciviro maakt ruimschoots van zijn « recht » gebruik.

Dan volgt een reeks zinnen die aanvangen met « dank zij den goeden wil », de eene al dommer dan de andere. We reciteeren slechts één. « Dank zij den goeden wil wordt alle geloof en ongelooft gehuldigd. » Calciviro pas op ! die alles huldigen, waarheid en onzin, goed en kwaad, geloof en ongelooft, zijn menschen die de gave van onderscheid missen.

Als slot : La fino kronas la verkon — « Den 25e December is Esperanto de Kristus die U zegt : « alle menschen van goeden wil laat uw kinderen tot mij komen ».

Dat moest natuurlijk volgen ; Kristus vervangen door Esperanto en Dr Zamenhof en aan hen de leer van Kristus toeschrijven, dan hebben we Kristus niet meer noodig. Wraakroepender kan het al niet. **Ziedaar waartoe « neutraliteit » in staat is en hoe vrijdenkers vrij zijn om te denken en te geloven wat ze willen, ook het meest onzinnige.**

Dat Calciviro zijn goeden wil eens aanwendt om te begrijpen dat hij op deze manier een slechte propaganda maakt voor Esperanto, die voor gevolg kan hebben dat de katholieken, Esperantisten en niet Esperantisten, de neutrale E-beweging niet alleen niet steunen maar bestrijden zullen.

Dat Calciviro een idealist wil zijn juichen we toe, maar betreuren dat hij zijn idealisme op onwaarheid grondvest. Indien hij werkelijk van goeden wil is, dat hij dan het Kristendom beter bestudeere, dan zal hij daarin een stevig fundament vinden van zijn goeden wil en een ruime baan voor zijn idealen, want elk idealisme dat onverenigbaar is met de leer van Kristus, is ersatz.

C. van Hoogstraten O. Praem.

I. K. U. E.

« NIA XX-a JUBILEA »

Ljubljana 6 - 11 Aŭgusto - Jugoslovujo.

EKSPozICIO DE SLOVENA ARTO. — De la 6a - 16a de Aŭg. okazos ekspozicio, sub protekto de la L.K.K., de slovena arto precipe religia arto. La Esperantistoj ĝuos 50 % rabaton por enirkotizo. Krome povos ĉiu Esperantisto aĉeti konstantan enirbileton, kiu kostas 4 int. respondkupononj ; sur ĉiu konstanta enirbileto estas numero. La numeroj estos lotumataj kaj 10 el ili gajnos belegajn pentritajn bildojn de slovenaj artistoj en valoro de 10.000 Din. La bildoj estos reproduktataj en Espero Katolika. Ankaŭ tiuj kiuj ne vizitos la kongreson povas partopreni al la lotumado de la pentraĵoj. **Do aĉetu tuj konstantan enirbileton, sendante 4 int. resp. kupononj, kaj vi povos fariĝi posedanto de belega slovena pentraĵo !**

INTERNACIA REVUO DE NACIAJ KOSTUMOJ. — Oni intencas aranĝi grandstilan revuon de naciaj kostumoj. Ĉiu popoloj sub unu tegmento, ili tamen sin komprenas unu la alian. Tia interesega revuo montrus plej evidente la praktikan valoron de Esperanto. La grupoj konsistu el diversseksaj homoj (plej bone : paroj), kiuj prezentu erojn el popola vivo, kiel dancojn, kutimojn ktp. Plej bonvenaj estas grupoj de 3 aŭ 4 paroj kun muzikantoj, kiuj muzikas je populaj instrumentoj. Poste ĉiu grupo aparte prezentu dancon de sia nacio aŭ regiono. La L.K.K. prizorgos belan premion por la plej bela grupo. Pri partopreno oni kiel eble plej baldaŭ informu la L.K.K.

KONGRESLIBRO. — La kongreslibro de Nia XXa estos belega, riĉenhava, riĉe ilustrita kaj havos ĉirkaŭ 100 paĝojn. Ĉiu aliĝinto kiu ne nur aliĝos sed ankaŭ pagos sian kotizon antaŭ la 10a de Junio trovos sian adreson en la kongreslibro. Ĉiu kiu sendas sian fotografajon kaj 45 Din. por la kliŝo kaj aliĝis al la kongreso, rajtas sendi ankaŭ anoncon 5-linian, kiu aperos sub la fotografajo.

RABATO. — La L.K.K. prizorgos la rabaton sur la fervojoj kaj vaporŝipoj en Jugoslavujo. La landaj ligoj zorgu por la rabato en sia lando. (Do tuj aliĝu, por ebligi la akiron de rabato !)

EKSKURSOJ. — La posttagmezoj de Lundo kaj Mardo estas liberaj por ege interesaj ekskursoj.

PROPAGANDO. — Glumarkoj belaj estas haveblaj ĉe KVEV. 25 por 3 fr. ; 50 por 5 fr. ; 100 por 8 fr. Kiuj deziras afiŝojn por *pendigi ilin en urboj kie loĝas multaj Esperantistoj*, skribu al nia sekretariejo en Borgerhout.

SUBTENNO. — Tiuj kiuj ne havos okazon partopreni la kongreson, tamen ne preterlasu fari iun monan subtenon, por ebligi la L.K.K. fari el nia XXa plej brilan kongreson.

GRAVA MISKOMPREENO. — Ordinare la partoprenantoj de niaj IKUE-kongresoj sin anoncas tre malfrue. Tio estas grava miskompreno, ĉar frua aliĝo instigas ankaŭ aliajn al aliĝo kaj ebligas al la L.K.K. fari novajn projektojn kaj ĉion bonorde prepari. Krom tio, frualiĝo estas ankaŭ por la kongresistoj mem utila el diversaj vidpunktoj. La L.K.K. de Nia XXa preparis por la frualiĝintoj belajn premiojn. Do, ne prokrastu aliĝi. Nia XXa Jubilea estos unu el la plej internaciaj IKUE-kongresoj. La L.K.K. diras : « ni certe povas kalkuli ke almenaŭ 25 landoj partoprenos ». Sed ankaŭ de via frua aŭ malfrua aliĝo povas dependi pligranda aŭ plimalgranda nombro de partoprenantoj. Ni rememoras ke ni iris al Hago, iom timema pri la sukceso, ĉar ni sciis nur pri 173 partoprenantoj, sed jen, ni renkontis 800 kongresistojn ; do 600 aliĝis tro malfrue. (Ni sciis eĉ ke grupo venis en Hagon tuj post la fermo de la kongreso, kiu grupo vojaĝis 100 K.M. vane.) Kiom da personoj ne aliĝis tial ke ili pensis ke la nombro de partopr. estos tro malgranda ? !

ATENTIGO. — La flandroj kaj Valonoj kiuj vizitos la kongreson pagu al la ĝenerala Sekretario de IKUE, Sro Aleš Berka, Brno, aŭ al KVEV Aalst. Sendi monon al Jugoslavujo estas tro malfacile. La kotizo estas tre malalta : 35 fr. Samtempe niaj samlandanoj tamen ne forgesu informi nin, ĉu ili volas vojaĝi kun la FUKU-karavano, kion ili deziras koncerne la vojaĝon kaj al kiu ili pagis. **Ne prokrastu !** Jam kelkaj FUKU-anoj aliĝis.

N. B. La adreso de la L.K.K. estas : Damjan Vahen, Reslova 29, Ljubljana-Jugoslav-

EEN INTERNATIONAAL HOOGSTAAND
MAANDBLAD VOOR 20 FR. PER JAAR I

Ten einde aan al onze leden de mogelijkheid te bieden zich op één der beste, oudste en degelijkste tijdschriften te abonneren. brengen wij van af heden de abonnements-prijs van Espero Katolika voor 1938 op 20 fr. 1) omdat E.K. dit jaar zijn 35 jarig bestaan viert en wij dit willen vieren door aanwerving van zooveel mogelijk nieuwe abonnees en 2) omdat wij beloofd hebben dat ons land in 1938 minstens 100 abonnees zou tellen. Er ontbreken er nog 15, wie brengt ze aan? Stort dadelijk 20 fr. op postrekening 209034 van L. Calloens, Aalst. De reeds verschenen nummers ontvangt U binnen enkele dagen. Wie jaargang 1937 verlangt voege er slechts 10 fr. bij. E. K. is internationaal! E. K. is schoon geillustreerd!

NI IRIS AL KONGRESO

(Fino)

Je alia demando Sro Heilker deklaras ke IKUE ne povos akcepti en iu lando pli da ligoj ol ekzistas oficialaj lingvoj en ĝi.

F-ino Royer (Francujo) parolas pri la Pariza konferenco « Esperanto en la moderna vivo ». Si organizis Diservon kaj je demando faris raporton por la komisiono « Religio kaj Filozofio ». Si deklaras ke la konferenco ne estis kontraŭ-katolika, kvankam ĝi ja ne estis katolika manifestacio.

Responde Sro Heilker laŭlegas el la preŝita oficiala programo de la konferenco kelkajn punktojn, nome pri la teatraĵo, la vizito al Montmartre kaj la amuzejoj, la prelego de delegito de la Barcelona registaro pri la nova kulturo en Hispanujo, la noto pri la statuo de la Chevalier de la Barre; li taksas tiajn kongresojn por ni kondamnitaj, malgraŭ la Meso; tia kadro estas nedefendebila.

P. Decoene proponas sendi dankleteron pro ilia interesiĝo al nia Katolika Esperanto-movado al du redemptoristaj episkopoj, membroj de IKUE kaj abonantoj de E. K., Monsroj Cuvelier kaj Moris, niaj anoj cetere; akceptite.

Sro Golobić (Jugoslavujo) petas ĉu IKUE ne povus akcepti kiel membrojn sen kotizo la laboristajn senlaborulojn de lia lando; Sro Heilker respondas ke ni ne povas akcepti tion ĉar la aliaj ligoj petus la samon kaj ĉar cetere la stato de la kaso ne ĝin permesas.

Sro Van der Burgt, sekretario de N. K. tre ŝatus daŭran interkomunikadon kun la landaj sekretarioj per interŝanĝo de revuoj ktp. Sro Berka interrilatigos lin kun la ĉeĥa sekretario.

Sro Heilker dankas la ĝeneralan sekretario Sron Berka kaj la kongresraportistojn pro ilia laboro, kaj donas la parolon al Sro Brouwer, prezidanto de la LKK, por la **adiaŭaj paroloj**.

Morgaŭ, tiel Sro Brouwer, nia XIXa estos parto de la pasinteco, sed ĝi restos io elstara, ne elsirebla el lia memoro. La adiaŭo de la multaj novaj ĝemikoj kaŭzas al li doloron sed li sentas ankaŭ ĝojon pro la sukceso de nia kongreso: tio estas kontentiga por la anoj de la LKK; ili faris sian eblon, oni bonvolu pardoni se io ne estis tute laŭ la atendo au la plaĉo. Li dankas ĉiujn pro ilia ĉeesto kaj vigla partopreno; la kongreso estu por ili neforgesebla.

Multaj personoj laboregis por prepari la kongreson kaj ĝin prizorgi; kelkaj laboros ankoraŭ poste: al ĉiuj dankon. Sed unu precipe laboregis, eĉ tranokte; li estas la akso de la tuta kongreso; li deziris ripozon, li preskaŭ devige akceptis la ŝarĝon de sekretario-kasisto, sed li modeste faris kion li devis fari kaj tiel kronumis sian longjaran poresperantan laboron: ce Nia XIXa apartenas Sro Marvee. Eĉ en Esperanto ne estas vortoj por nomi lian laboregon kaj sufiĉe lin laŭdi kaj danki (ĝenerala aplaŭdego). Aparte li dankas ankaŭ ĉiujn liajn helpantojn, precipe Srojn Tubbing, van Haaster kaj Cras. Ankaŭ dankon al F-ino de Ruiter kaj ŝiaj helpantoj kiuj prizorgis la Esperanto-paĝon de Residentiebode kaj laboris dum ni ĝuis, plue elkoran dankon al ĉiuj kiuj laboris en akceptejo, informejo aŭ salono kaj ne malplej al la sindonaj junuloj kaj skoltoj. Nia XIXa pasis, ĝiaj fruktoj restos.

Sro Marvee dankas Sron Brouwer pro liaj afablaj vortoj kaj siavice dankas siajn kunlaborantojn kaj ankaŭ la N. K.-grupojn kiuj aĉetis subtenkuponojn de la kongreso.

Frato van Zon anoncas ke li notis 115 novajn abonojn al E. K. dum la kongreso, al kiuj la Prezidanto aldonas novan abonanton, la Redakcion de Residentiebode, kiun gratulas laŭta aplaŭdo.

Sro Duffaud (Francujo) deziras ke la pasintaj diskutoj neniel malservu la amikecon.

Sro Golobić (Jugoslavujo) dankas la helpantojn kiuj sukcesigis lian prelegserion pri Slovenio en Nederlando kaj deziras ĝis la revido.

Frato Monulfo dankas la Kongresanaron nome de I.K.I. pro la kolekto de pli ol 70

guldenoj; Sro Heilker nomas ĝin la monumento por P. Poell.

Sro Damen, prezidanto de la organiza komitato, dankas precipe la eksterlandanojn kaj deklaras la Nederlandanojn pretaj veni ĉe lin, poste li, nome de ĉiuj, dankas Sron Heilker ĉar li faris el nia kongreso monumenton de katolika Esperantismo.

Sro Berka deklaras la kongreson ŝtupo pli supera en la realiĝo de nia idealo kaj dankas nome de la ĉeĥa karavaneto pro ilia agrabla restado en la libera lando Nederlando.

Por fini Sro Heilker deziras ankoraŭ elverŝi kofron da dankaj vortoj, dankon al la LKK, al la organiza komitato prezidata de Sro Damen, al la Residentiebode kiu faris unuafaje por katolika kongreso kion faris pasintjare la katolika Reichspost por la neŭtrala Viena kongreso, al Suda Kruco pro la belega prezentado de la fama klasika dramo, al la ekster- kaj enlandanoj, al la diskutintoj, al P. Eras kaj P. Ouwendijk pro ilia majstra pritraktado, precipe al P. Eras kiu per la profundeco de sia temo estis kaŭzo de la gratuloj de Nia Sankta Patro la Papo. Li dankas la honoran komitaton, la episkopojn, la ministrojn, kaj speciale tutkore la urbestron, kiu kuraĝis kontraŭ la monda juĝo paroli en Esperanto. Aparte li dankas Nian Sanktan Patron kiu benis niajn laborojn per Sia apostola Beno; la estraro perletere dankos pro tio pere de Monsro Paolo Giobbe, Apostola Internuncio en Hago.

Kaj super ĉio ni ŝuldas grandegan dankon al Tiu Kiu Sola faras ke ni povas ion fari, al Dio, al Kiu ni ŝuldas ĉiun agon, ĉiun spiron, ĉiun vivmomenton; kaj tion konfirmis la tuta kongresanaro per emociplena kantado de « Ni volas Vin ». Ĉi-tie eble la kongreso atingis sian supron kaj Sro Heilker profitas la momenton por danke deziri al la prezidanto de la LKK ke lia kongreso ne trallugu la mondon kiel la saĝoj de la fajraĵoj por poste eksplodi, sed ke poste ĝi brilu el la pasinteco pro siaj fruktoj.

La lasta kunsido de la kongreso estas fermita per la Kristana saluto, kaj deziroj de bona vojaĝo kaj revido. Ni interŝanĝas multajn manpremojn, kelkajn jam rapide, kaj ĉiu forlasis kontraŭkore la ŝategatan kongreson; certe la kongreso restos en ĉies memoro, kaj tion ni ŝuldas ĉefe al Sroj Heilker, Brouwer, Marvee kaj Damen.

Donu la kongresa impulso al ĉiuj renovi-

gitajn fortojn por plulabori por la venko de nia Katolika Esperantismo kaj transplantu la semerojn, en la kongreso jetitajn, en propran teron.

Ĉu ni estas kontentaj pri la kongreso? Jes, ege! Ĝi staris sub altaj aŭspicioj ekleziaj kaj ŝtataj, disvolviĝis en frata kunlaboro kaj kristana atmosfero kaj estis favorata de Papa Apostola Beno. La kongrestemoj estis tre altvaloraj kaj bone pritraktataj, multaj interesaj kaj gravaj punktoj estis pridiskutataj el kiuj kelkaj espereble baldaŭ trovos praktikan solvon. La organizo estis bona: ni havis ĉiutage nian Meson kun prediko kaj nian ĵurnalon; escepte la teatran vesperon kaj la Diservojn, ĉio koncentriĝis en la historia Ridderzaal, kvazaŭ en la koro de la Regno; la festaranĝoj estis bonegaj, nur dum la ekskursoj ni perdis iom da tempo, sed mi volas supozi ke estis pro neatenditaj eksteraj kialoj.

Plie la vetero nin favoris; post la unua tago la duba ĉielo pliheliĝis kaj ĝi restis bela, eĉ plue dum du tagoj kiujn mi ripoze ĝuis postkongrese kun nia nelaciĝebla Prezidanto Heilker en lia hejmo kaj en Amsterdam, pro kio lia estimata edzino kaj li mem ricevu plej elkoran dankon. Kaj mi finis per rea vizito, iom pli detala ol la dumkongresa, al la Jamboreo, sed... tio estas alia afero.

Bri'a kongreso finiĝis: ĝis la venonta! Sed ĉu ĉeestos pli da Flandroj? vi donu al tio respondon, karaj gelegintoj!

NOMO.

La Esperanto-mondo

ESPERANTO OP HET INT. EUCHARISTISCH KONGRES TE BUDAPEST.

Wij vestigen er de aandacht op dat degenen die de Esperantovergaderingen willen bijwonen eerst moeten ingeschreven zijn bij het Nationaal Comité en vervolgens 4 antwoordkoepons moeten opzenden naar het: Esperanto Subkomitato, Petöfi Sandor utco 9. IV. 3 Budapest.

De deelnemers aan de Esperantobijeenkomsten zullen bij hun aankomst een apart Esperanto-kongresinsigne ontvangen alsmede de Esperantotekst van de Kongreshymne.

De tweede uitgave van de Esperanto-brochure is verschenen. Ze geeft het heele programma van het Kongres. Wie ze verlangt te ontvangen schrijve aan onze redaktie.

Onbevoegden hebben de laatste weken in de dagbladen geschreven, als zou Esperanto geen officieele taal van het Kongres zijn. We vragen onze leden dergelijke artikels uit te knippen en te zenden, met naam van het blad, aan onzen propagandadienst Jos. Douwen, Aug. Van Daelstr. 2, Wilrijk.

MALLONGAJ INFORMOJ

▲ **Japan.** Er werd een vereeniging van Esperantistische geleerden gesticht die voor een half jaar reeds 450 leden telde.

▲ **Engeland.** Het vorig jaar werd in 29 scholen Esperantoonderwijs gegeven, aan 1193 leerlingen. Wales is hierbij niet inbegrepen.

In Colchester zal spoedig het Esperanto in het programma van alle klassen worden ingevoerd in plaats van het Fransch. Mocht dat in heel Vlaanderen ook mogelijk worden!

▲ **Java.** In de handelsschool van Malang begon men met Esperantoonderwijs.

▲ **Frankrijk.** De afdeeling Haguenau-Wissembourg van de oudstrijdersbond nam een resolutie aan waarin het verplichtend Esperantoonderwijs geeischt wordt op alle scholen. (Heroldo).

▲ **Hongarije.** In het parlement pleitte ex-minister Dr Agost Bénard voor de invoering van Esperanto op de middelbare scholen. De minister van onderwijs beloofde de zaak ernstig te onderzoeken. (Heroldo).

Recenzoj

Vivo de nia Vivo, de Patro A. Bangha S. J. Esp. traduko de M. Bolváry.

Jen valora libreto, eldonita de la Ligo de Jesu-Koro en Budapest, okaze de la Eŭkaristia kongreso. Ĝi pritraktas laŭ agrabla kaj trafa maniero diversajn temojn pri la Eŭkaristio. Vere, libreto por la nuntempo. Tiaj pripensoj estas necesaj kaj plaĉaj al ĉiu moderna katoliko. Ni tamen ne volonte vidas la pesimistan diradon: « ... nur pro timo de infera puno ni decidis iri al la sankta komunio en paskotempo. » Tiaj vortoj povus impresi la nekredulojn kvazaŭ tia agadmaniero estus ĝenerala ĉe ni katolikoj.

La teknika prizorgo de la libreto estas tre bona; plaĉa aspekto, bela papero, bona preso. Ankaŭ la lingvo estas bone prizorgita. Do ĝi estas libreto rekomendinda el ĉiuj vidpunk-

toj. Precipe la anoj de la Ligo de Sankta Koro ne preterlasu tiuj mendi ĝin. Prezo 7 fr. 55 paĝoj. Vendoinstituto de FUKU, Egied Segerlaan 14, Wilrijk.

C v H.

Verda Koro, de Julio Baĝhy, recenzita en la lasta numero, kostas fr. 16.50. Ege leginda libreto.

Ellernu, la daŭriga kurso de D-ro Ferencz Szilagyí, pri kiu ni en la lasta F. K. parolis, kostas nur fr. 16.—

PRIJSVERMINDERING.

De volgende boeken zijn merkeliĝk in prijs verminderd: Esperanto in 20 lessen door A. Blok fr. 15.— in plaats van fr. 18.—

Zakwoordenboek Blok, gebonden, fr. 15 in plaats van fr. 18.—, zooals verkeerd opgegeven werd.

Leerboek voor Esperanto, door Dr. Ferencz Szilagyí, kost nog slechts fr. 11.— in plaats van fr. 12.—

Degenen die « Leerboek voor Esperanto » en « Ellernu » beiden van Dr. F. Szilagyí, samen bestellen, kunnen ze verkrijgen mits den prijs van fr. 26.— in plaats van fr. 29.—

Nia movado

FUKU-GRUPO MOL. — La grupo kunvenis dufoje en Marto kaj niaj membroj multope ĉeestis. Ĉiam agrablaj kaj interesaj, niaj kunvenoj neniam enuigas. En la unua kunveno, post la kutimaj preĝoj kaj prelegado de la raporto, la prezidanto komunikis inviton de « La flandremo » el Antverpeno, al ĝia festo de la 26a-27a de Marto.

Ni kune solvis vizitkartenigmojn; poste ni korektis sur la tabulo la hejmtaskon kaj kopiis novan taskon por la sekvonta kunveno. Inter la diversaj seriozaj partoj, ni gaje kantis kaj babiladis. Je la fino de la vespero ni enskribis la unuan honormembron de nia Mola grupo. Ke multaj sekvu la ekzemplon!

En la dua kunveno, bonvolema FUKU-grupanino donis lertan disertadon. Si elektis fragmenton el « Kristnaska Triptiko »; ŝi klarigis kaj analizis, laŭ modelo de « El diversaj lingvoj » pli ol 100 vortojn. La varmega diskuto pri kelkaj vortoj montris sufiĉe la atenton de la aŭdantaro. La vespero agrable finiĝis. Ni lernis diversajn ĉenkantojn kaj ni babiladis amike ĝis la 10 1/2. Ni disiris gaje diskutante ankoraŭ pri transitivaj kaj netransitivaj verboj. (M. B.)

DELEGITECO. — Nia ano, Sro A. Tournel, Guido Gezellestr. 5 en Hasselt, sin spontance prezentis kiel delegiton de nia Unuiĝo por tiu urbo. Ni ĝoje akceptis, li estu bonvena en la estraro de F.U.K.E. Laŭ planoj de li proponitaj, ni antaŭvidas grandan propagandon en la regiono kaj ni deziras al li kontentigan sukceson. Li ankaŭ eniris la radiostacion de nia unuiĝo en Loksbergen-stacio. Ni ege dankas lin pro tiu ege valora helpo.

Ankaŭ akceptis la delegitecon por Geeraardsbergen, Sro Cyriel Bernaert, Pelgrimstr. 1. Pro sia estinta fervora agado en Geeraardsbergen, nia nova tiea delegito multe promesas por la estonto. Plue en tiu urbo jam ekzistas vigla kerno, kiu certe per amika kunlaborado multe atingos por nia movado. Sro Bernaert estu bonvena en nia estraro.

Ni samtempe atentigos niajn legantojn ke estus dezirinde ke multaj tiaj volemaj anoj akceptu la delegitecon, laŭ ekzemplo de Sroj Tournel kaj Bernaert: la vivo kaj antaŭeniro de nia movado katolika dependas precipe de la agado de viglaj delegitoj. En Okcidenta-kaj Orienta Flandrujoj, Brabantoj kaj Norda Limburgo estas regionoj kie FUKU ne estas sufiĉe reprezentata. Kiu sekvas?

KONDOLENCOJ. — La 20an de Marto mortis en Antwerpen la edzino de nia ano Sro Moris De Ketelaere. FUKU prezentas al la dolorige frapitaj patro kaj infanoj, siajn kristanajn kondolencojn kaj petas preĝojn por la animripozado de la kara mortintino.

KURSO ANTVERPENO. — La kurso pli ol kontentige funkcias. De la 42 enskribitaj, regule 35-38 ĉeestas kaj vigle laboras. Pli ol 30 regule faras sian hejmtaskon, kaj inter ili estas kelkaj kiuj kvazaŭ senerare jam skribas Esperanton. Ni ricevis la viziton de la inspektoro, kiu ĉeestis tutan lecionon kaj je la fino esprimis sian kontentecon, ne nur pro la lerta instrumaniero de la instruanto, nia Prezidanto, sed ankaŭ pro la fervora kaj multnombra ĉeesto de la lernantoj. Li esperis ke inter la lernantoj sin trovas kelkaj, kiuj sekvantan jaron siavice povos gvidi kursojn por komencantoj kaj samtempe invitis la Prezidanton akcepti la avidon de supera kurso. Li petis la helpon de FUKU en la organizado de tiuj kursoj kaj instigis la lernantojn aliĝi al nia katolika unuiĝo. Ĉiuj varme aplaudis tiujn vere kuraĝigantajn vortojn.

Lernanto metis je nia dispono gramofonaparaton, ebligantan aŭdigi niajn Esperanto-diskojn. Regue ni kantigas la Esperon, komence kaj fine de la kurso, kio ne nur agrabligas la kurson sed ankaŭ ebligas la lernantojn kanti tiun belan himnon.

ESPERANTO-EXAMEN voor iedereen toegankelijk op 8n Mei as. te Antwerpen.

Ons Verbond richt een examen in met recht op diploma voor al diegenen welke de deelnemingsprijs betalen en minstens 6/10 der punten behalen. Dit diploma, uitgaande van een afdeeling van een Wereldverbond (IKUE) is stellig het meest officieele dat hier te lande bestaat.

Examen A (simpla kapableco) omvat: diktaat (10 punten), Opstel van 5tal lijnen (10 p.), vertaling van 10 zinnestjes (10 p.). Verklaringen in 't Nederlandsch van spraakleer en vormen (10 p.). Mondelings: Lezen (10 p.), uitleg in 't Nederlandsch over taal en beweging (ook IKUE). (10 p.)

Examen B omvat dezelfde oefeningen als A, echter met moeilijker tekst, langer opstel en uitleg in Esperanto. Gebruik van woordenboek is NIET toegelaten.

Diploma's worden uitgereikt te Antwerpen (Paroch. Scholen) en te Brugge (Sinksen). Inschrijvingen liefst vóór 5n Mei as.; op postcheckrekening 412354 van het Katholiek Vlaamsch Esperanto Verbond, Aalst. Laatkommers kunnen nog betalen in het lokaal: Syndicaat der Landelijke Bedienden Centrale, Korte Nieuwstr., 44 Antwerpen, op Zondag 8n Mei 1938 te 9 uur 's morgens. Prijs: 10 fr. voor diploma A. 20 fr. voor examen B.

Verdere inlichtingen op ons secretariaat.

FUKU KAJ LA EŬKARISTIA KONGRESO EN BUDAPEST. — Laŭ peto de la Blankaj Patroj de Afriko, kelkaj FUKU-anoj tradukis Esperantlingven « Juliana van Tongeren, de zonnige Eucharistische bloem » kiun eldonos la Esperanto Subkomitato ĉe la E. K. en Budapest. La tradukon bonvole korektis nia ano Sro H. Vermuyten, kiun ni ĉi tie ege dankas, same kiel ankaŭ la tradukintojn.

FLAVA BROŬURO. — En Aprilo ni eldonos interesan 26-paĝan broŝuron kiu enhavos ĉiujn sciindaĵojn pri nia Unuiĝo. Tiu celas do la propagandon ĉe la interesuloj, kiuj havos kompletan superrigardon pri nia agado, estraro, diversaj servoj de FUKU, ktp. Ĝi

estos senpage sendota al ĉiuj kiuj mendos ĝin. La delegitoj disponos je bona kvanto. Ĉiu FUKA-ano ĝin mendu kaj disdonu efike.

ESTRARKUNVENO. — La 8an de Majo okazos estrarkunveno en Syndikaat, Korte Nieuwstraat 44, Antverpeno. Ĝi komenciĝas je la 2-a posttagmeze. Ĉar tiu estos la lasta antaŭ nia ĝenerala kunveno en Brugge, ni insiste petas niajn delegitojn kaj estraranojn, kiuj iomete povas, ĝin ĉeesti. Kunvokilon ni ankoraŭ sendos al niaj delegitoj.

BILDETO DE « NIA SINJORINO DE FLANDRUJO ». — Jam trian eldonon de tiu bildeto, kun la konata kanto dorsflanke, ni estis devigataj presigi. Ĉiuj rememoras la belan kunkantadon en Loveno, pasintan jaron post la Meso Sankta, kiu tiel plaĉis al la ĉeestantoj. Tiun ĉi jaron ni denove en Bruĝo kantigos ĝin. Ĉe la enirejo de la preĝejo niaj propagandistoj ĝin disvendos po 1 franko.

I. K. I. — Kiel jaran subtenon por I. K. I., FUKA sendis 20 fr. al Sacerdoto Van der Pluym, kapelaan, Wandre, kiu estas la reprezentanto de I. K. I. en Belgujo.

RADIO LOKSBERGEN. — Okaze de la enkonduko de la somerhoro, la direkcio de Radio-Loksbergen sciigis al ni ke ekde Dimanĉo, 27 Marto, nia Esperantoelsendo okazos ĉiun Vendredon je la 18a horo anstataŭ Sabate je la 20.10. Ege dankemaj ni estus se niaj anoj-aŭskultantoj de tempo al tempo sciigus ion al ni pri la kvalito, enhavo de tiuj dissendoj kaj samtempe farus sugestojn kaj eĉ kritikojn. Ni samtempe atentigas niajn anojn ke dum Aprilo nia delegito por Hasselt, Sro A. Tournel prizorgos serion de tre interesaj paroladetoj. Do, ĉiuj kiuj povas, ĉe sia aparato ĉiun Vendredon!

ĈU VI KOMPRENAS ke kiam iu el niaj anoj foriras al la misioj, li tiam ne plu havos bonan okazon por pagi aŭ pagiĝi sian kotizon kaj abonon? Tamen ankaŭ al la misiistoj Flandra Katoliko kaj Espero Katoliko estos tre bonvenaj. Kiu pagos Fl. Kat., kiu E. K. por niaj anoj Patro Hendriks irinta al Brazilio, Patro Egberto en Hindujo kaj por misiistoj de Scheut en Belga Kongo?

Por estonte ebligi regulan aperon de nia revuo, ni petas ke oni ensendu la kopiojn nepre ANTAŬ LA UNUA de la monato. (R)

Tra la Gazetaro

BELGA ESPERANTISTO. — Artikolo pri la Zamenhof-spirito. Vere menciinda artikolo pro la sama stultajo kian ni preparolis en nia unua artikolo. Ni citu: «...inter tiu unua dato, solena por ni, tiu de la naskiĝo de nia Majstro, kaj tiu alia dato, solena por ĉiuj en la mondo — ĉu ili estas katolikoj, aliregiuloj, aŭ eĉ senkredaj — la gaja festo de la Kristnaskiĝo. Ambaŭ tagoj, la unua por la Esperantistoj, la dua por ĉiuj, iĝis en la daŭro de la jaroj la memorigtagoj de la Paco, de la paco inter la homoj kun bona volo.» Oni estas tiel neŭtrala, ke oni havas la bonan volon fari ankaŭ la Kristanajn festojn neŭtralaj. Ni protestas kontraŭ tiu stulta misuzo de niaj Kristanaj festotagoj. Se ili opinias ke Kristnasko havas grandan *objektivan* valoron por ili, ke ili tiam ankaŭ atestu por Kristo, Alie ili silentu ankaŭ pri Kristnasko.

AŬSTRIA ESPERANTISTO. — La Marta numero publikigas la ĉefpunktojn de la parolado de ekskanceliero Schusnigg pri la sendependeco de Aŭstrujo, sub titolo: Ĝis la morto ruĝ-blanka-ruga. Vivu Aŭstrujo! Apenaŭ aperis la numero kaj jam okazis la Anschluss. Kio okazos pri tiu revuo? Ĉiuokaze ĝi devos ŝanĝi sian tendencon.

JUNA IDEO. — En ĝi aperis interesa artikolo de Leop. Lackner, Wien, pri «Murdarmiloj kiel ludiloj». La verkinto prave diras ke estas stulta kaj malutile edukado, doni al infanoj armilojn kiel ludilojn. Oni preferu doni sportludojn, gimnastikludojn, teknikajn ludojn. «Ni eduku la gejunulojn por la paco, akcelante, kie ajn ni povas, ĝiajn spiritajn kaj korpajn aspirojn kaj ambiciojn, tiel longe ili restas en pacaj limoj.»

RADIESTEZA GAZETO. — Revuo por radistesoj. Ni legas en ĝi ke 80% de la homoj havas la sesan sentorganon, kiu ebligas al ili sukcese uzi la divenvergon kaj pendolon. Provu foje ĉu ili pravas!

HEROLDO. — Tiu grava gazeto estas ĉiam interesa. Tre interesa estas la ĉefartikolo: Ni portu la lumon. En tiu artikolo oni je plej praktika maniero refutas la ĉiaman aserton kvazaŭ Esperanto estus «nur artefaritajo». Oni pravas ke ankaŭ la ... altgermana lingvo estas artefarita, nome de Luther. Antaŭ Luther ne ekzistis komuna lingvo en Germanujo sed nur multaj dialektoj. Luther el tiuj dialektoj *faris* lingvon, por sia batalo, kiu estis egale parenca al ĉiuj germanaj dialektoj, kaj tuj komprenebla por la diversregionaj germanoj. Tamen daŭris 300 jarojn ĝis kiam, ĝi de Goethe, Schiller, Heine ktp. ricevis sian klasikan formon.